

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº6, Junio, 2009

Saluton, kara Leganto, denove ni renkontiĝas sur la paĝoj de nia monata bulteno. Dekomence en la enkonduka alineo ni volas pardonpeti pro la prokrasto kun la apero de ĉi numero. Ni longe atendis por la artikoleto pri la kongreso de Esperanto-USA en Sankta Luiso, sed... Sed dankon al Sepideh pro la sendita komuna foto. Okazis ankaŭ tio, ke julie ni havos kaj la piknikon kaj la kunsidon (vidu la subon). Dankon pro la kompreno.

La redakcio

E-USA Kongreso en Sankta Luiso



En la najbara ŝtato Misurio, en Sankta Luiso sukcese okazis la 57-a kongreso de Esperanto-USA. Partoprenis ĝin preskaŭ 90 gesamideanoj de multaj anguloj de Usono, inter ili – 11 ilinojanoj kaj kelkaj membroj de nia E-societo. Oni devas menciigi, ke Sankta Luiso estas ofta kongresejo, tie okazis ankaŭ la 7a (1959), 15a (1967), 47a (1999) jarkunveno de ELNA. Ili ĉiuj, samkiel la lasta, ricevis egan reeĥon en diversaj amaskomunikiloj. Pli afable, ke la 2009-kongreson organizis nia societano (sed ne ilinojano) d-ro Ronald Glossop. Honoron al li! Interesaj, riĉenhavaj ekskursoj al fervoja stacidomo, la Pordega arkego, la Botanika ĝardeno (Shaw's Garden), la Artmuzeo k.a. estas, sendube, lia merito. Ne pensu, ke partoprenintoj de la kongreso nur amuziĝis

kaj distris sin. Esperantaj aranĝoj, kiel kutime, posedis la gravan lokon en la programo de la evento. La ĉeftemo de la kongreso estis "Kiel varbi novan generacion", kiun estris kaj gvidis d-ro Boriso Kolker (honora gastpreleganto). D-ro de lingvistko, kiu dediĉis sian disertacion al al Internacia Lingvo, s-ro Boriso de 1957 estas fervora ĝisosta E-isto. Li estas ankaŭ aŭtoro de populara E-lernolibro Vojaĝo en Esperanto-lando, kiu furoris dum la multaj E-aranĝoj. Dum la kongreso li transdonis sian sperteron al la anime "junaj" gesamideanoj. Krome, partoprenantoj havis okazon pridiskuti problemojn de skoltoj, E-instruistoj ktp. (*La raporto estis preparita laŭinformoj en Interreto kaj broŝuro de la kongreso*)

Esperanto kaj politiko

La germania sekcio de la poresperanta partio EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) en la eŭropuniaj elektoj, ricevinte 41 122 voĉojn, ne sukcesis atingi la necesan kvanton de voĉoj por ricevi ŝtatan subvencion. Necesis duona procento, sed la partio atingis nur dekonon de tio. El la ĝisnunaj esperantistaj anoj de la Eŭropa Parlamento estis reelektita Małgorzata Handzlik, kandidato de la granda pollanda partio Civitana Platformo, sed Ludmila Novak el Slovenio ne ricevis sufiĉan subtenon. Sed kio estas la plej grava – ĈIUJ balotintoj vidis en la balot-bulteno nomon Eŭropo-Demokratio-Esperanto! Pli perfektan reklamon malfacilas elpensi! La unua malgranda guto estas falinta!

El nia leterkesto

– Karaj samideanoj de Ŝikago, Mia nomo estas Stephan Mayer, mi havas 26 jarojn kaj venas de Germanio. Mi planas veturi al Usono por staĝumi kaj vojaĝi. Ĉu vi iam povus gastigi min en via urbo por 2-3 noktoj en junio, julio aŭ aŭgusto? Mi estus ege dankema renkonti vin, ĉar mi ŝatus lerni pri pli Usono kaj sia kulturo. Momente mi ne scias, pri miaj vojaĝplanoj, sed mi povus informi vin poste. Cetere, mi estus dankema, se vi povus disdoni tiun mesagxon al amikoj k. samideanoj. Stephan, (Stephan-HD@gmx.de);

– Grandan dankon. Aprila bulteno aparte interesas nin pro la artikolo pri la sviso Henri Dunant. Tre bone skribita. Mi ŝatus saluti vin kun la slogano de la ĝeneva ruĝa kruco: “Inter arma caritas” (inter la armiloj amo al la proksimulo). Mi pensas pli bone estus, se armilojn oni tute ne uzus. Kun gajaj printempaj salutoj, nome de la Lucerna Esperanto-Societo, Sonja Brun;

– Tre plaĉa artikolo pri Henry Dunant. Kun vera intereso mi ĝin tralegis. Cetere, kion mi deziris pli frue jam skribi, plaĉas al mi la nova aspekto de “Saluton!”. Videble vi perfektigis en la laboro! Koraj salutoj el Varsovio! Irek.

– Karaj samideanoj de la E-Societo de Ŝikago, mi kore salutas vin el Brazilo. Estas granda plezuro skribi al vi, dezirante Pacon kaj Sanon en la nomo de la organizo en kiu mi laboras kaj kiun mi reprezentas. Temas pri Legio de Bona Volo, kiu jam uzadas kaj apogadas Esperanton de antaŭ 60 jaroj. Ĉi tie oni ankaŭ instruas E-on al multaj infanoj. Mi profitas por sendi al vi nian paĝaron, kaj mi volas peti vin por propagandi pri la paca mesaĝo de mia organizo LBV en via lando, per viaj kanaloj, laŭ viaj eblecoj. www.bonavolo.com El Brazilo, mi kore dankas vin. Dian Pacon kaj Sanon!!! Ĝis poste, Paulo César

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

26an de Julio – tradicia pikniko okazos en la arbaro kvaronmejlo okcidenten de la stratkrucio Camberland kaj Irving Park.
Bonvolu nepre registriĝu per tel. (773) 344-2276 aŭ rete

araneoesp@yahoo.co.uk

28an de Julio – temo estos anoncota

25an de Aŭgusto – UK en Bjalistoko

